# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo aprilo 2017**

## DATREVENO DE D-RO ZAMENHOF

Dum tiu ĉi monato aprilo oni kunmemoras la 100-an datrevenon de la morto de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof. La konkreta tago de la datreveno estas la 14-a de aprilo: en tiu dato de 1917 forpasis en Varsovio la kreinto de la internacia lingvo Esperanto. Dum la tuta jaro 2017 oni organizas kaj organizos diversajn aktivadojn en la tuta mondo.

En Madrido, ni programis por la lundo, 24-a de aprilo, debaton en la sidejo de MEL, pri la temo "Kiu estas la aktualeco de la pensado de D-ro Zamenhof?". Ni diskutos liajn ideojn kaj verkojn, la "internan ideon" de Esperanto, la homaranismon, liajn iamajn iniciatojn. La debaton enkondukos José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, sed ni atendas la partoprenon kaj opiniesprimon de ĉiuj interesitoj.

Aparte, memoru ke por tiu ĉi jaro, MEL aprobis rabaton de la prezo de la libro "El hombre que desafió a Babel" je 10 €, kaj ke oni krome faros kampanjon pri donacado de ekzempleroj aŭ specialaj rabatoj por renkontiĝoj, vizitoj kaj similaj eventoj.

Ĉiuj homoj kun rilatoj al kulturaj institucioj, lernejoj, bibliotekoj, ktp, estas invititataj proponi al ili tiun verkon, kaj ankaŭ la aranĝadon de aliaj aktivaĵoj rilate al D-ro Zamenhof, ekzemple per prelegoj, ekspozicioj, artikoloj kaj aliaj.

## PRELEGO KAJ PLANOJ EN FUENLABRADA

La pasintan 15an de marto okazis prezentado de Esperanto en la Oficiala Lernejo pri Lingvoj en Fuenlabrada, okaze de ties "Tago de Malfermaj Pordoj". Ĝin gvidis Juan del Castillo, kaj la titolo estis: *"Esperanto, comunicación sin complejos"*.



Kiel ni informis, oni nun interkonsentas kun la estraro de la Lernejo por la ebla organizado de kurso en tiu institucio en la venonta aŭtuno.

## PRELEGO EN LIBREJO

La 22an de marto, Juan del Castillo prelegis ankaŭ en librovendejo Aida Books, apartenanta al neregistara organizaĵo samnoma, situanta en la madrida placo Getafe numero 2. Malgraŭ la tre pluva vetero, tamen 5 bravuloj ĉeestis la eventon.

## LEGADO DE DONKIĤOTO

Kiel jam tradicie, en aprilo okazos la publika legado de Donkiĥoto en kultur-institucio Círculo de Bellas Artes.

Ankaŭ esperantistoj partoprenos, la 22an de aprilo, sabate, je la 7a, per laŭtlegado de kelkaj paragrafoj de la verko en Esperanto. Oni bezonas du personojn; volontuloj sin anoncu al nia redakcio aŭ al madrid@esperanto.es, por rezervi la vicon por tiu jam tradicia aktivado. Ni speciale instigas tiujn, kiuj neniam partoprenis ĝis nun, kaj deziras ĝui la sperton.

## 76-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO KAJ ALIAJ AKTIVADOJ

Jam troviĝas en la reto, en la adreso http://esperanto.es/kongreso/, la provizora detala programo de la 76-a Hispana Kongreso kiu okazos en Teruelo, fine de junio, kaj ankaŭ la planoj pri antaŭ- kaj post-kongresaj aktivadoj. Oni organizas tre varian programon, kun ekspozicioj, muzikaj koncertoj, prelegoj, astronomia observado, kunvenoj, turismaj vizitoj al la urbo kaj proksimaj lokoj, kaj multaj aliaj aktivadoj.

Oni krome antaŭvidas renkonton por komencantoj kaj turisman viziton la antaŭan tagon, 22an de junio. Seminario por aktivuloj la 26an kaj 27an kompletigos la aktivadojn por tiuj kiuj povos resti por ĝui la urbon.

La 21an de junio oni organizos publikan prezentadon en Madrido, en la "Casa de Aragón" (placo República Argentina), pri kiu ni informos pli detale en venontaj bultenoj.

## KER-EKZAMENOJ EN JUNIO

La organizaĵo *edukado.net*, kun apogo de UEA, kunvokis por la monato junio mondan sesion de ekzamenoj de Esperanto laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).

Laŭ tiu ĉi modelo, la skriba kaj parola partoj estas aparte organizataj. Por la 10a de junio oni programis la skriban ekzamenon samtempe en diversaj urboj de la mondo. Unu el la sidejoj estos Zaragozo, kien povos vojaĝi ĉiuj interesitoj. La parola ekzameno estos celebrata dum la Hispana Esperanto-Kongreso kiu disvolviĝos du semajnojn poste, la 24an de junio, en proksima urbo Teruelo.

Por pliaj informoj: http://edukado.net/ekzamenoj/ker. Interesatoj kaj kandidatoj, bv. skribi al la adreso kurso@esperanto.es.

## VIZITIS NIN

Komencanta juna koreanino, Inhae, kiu uzas sian veturon tra Eŭropo por konatiĝi kun esperantistoj kaj plibonigi sian lingvonivelon venis al Madrido la lastan semajnon de marto. Ŝi rendevuis aparte kun iuj esperantistoj.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Pro la festoj de Pasko oni ne certigas tamen ke la oficejo estos malferma la 10an kaj 17an de aprilo; bv. kontakti unue antaŭ ol alveni.

Ni reprenas la unuasabatajn renkontiĝojn. La venontan 1-an de aprilo ni rendevuos je la 6-a vespere en la kafejo Café Madrid, en la strato Mesón de Paños, 6. Temas pri kafejo kie ofte okazas rendevuoj internaciaj, kaj situanta en centra strato, kiu iras el Ópera al la placo Mayor. Ideala ankaŭ por komencantoj.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com